



Bapto estas rito aŭ sakramento simbolanta la novan vivon de la kristana kredanto. Ĝi estas dividita de preskaŭ ĉiuj kristanaj eklezioj. La bapto de Kristo estas laŭ la tradicio celebrata en januaro.

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Vivopanoj	3
Apostoloj kaj iliaj atributoj	6
Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2019	9
Morto de la naciismo	13
Siegfried Krüger honora membro de BAVELO	15
Kristana kongreso en Révfülöp	16
Antisemitismo kreskas en EU	18
Edziĝo de muso - fabelo	20
Informetoj	22
Ebbe Vilborg forpasis	23
Mi volas unuigi min	24

## Redaktoraj vortoj

**K**iam mi skribas tiujn ĉi vortojn, mi samtempe aŭskultas televidan programon pri malĝusta agado en nia socio kontraŭ “ne-svedaj” etnoj. Pluraj artikoloj en la nuna Dia Regno pli malpli tuŝas saman problemon, kaj estas interese (aŭ pli ĝuste: bedaŭrinde) ke artikolo verkita antaŭ pli ol 100 jaroj de Endre Ady pri problemoj pro naciismo daŭre estas aktuala. Raporto de EU montras ke judoj en Eŭropo sentas ke la problemoj rilate al antisemitismo kreskis dum la lastaj jaroj.

La temo de nia ĉi-jara kongreso estas “mi estis fremdulo kaj vi gastigis min”. Eble vi, eble mi, en niaj limigitaj situacioj povas agi laŭteme kaj fari diferencon. Antaŭ kelkaj tagoj mi aŭdis pri centro, kiu helpas svedojn kaj enmigrintojn inviti unu la alian al kuna manĝo kaj tiel praktiki la lingvon kaj helpi trovi geamikojn trans la etnaj limoj. Ambaŭ grave por la integriĝo. En tiu nivelo ni ĉiuj povas agi. Kaj necese. Bonan legadon.

Johano 6, 41-51

41 Intertempe la Judajaj\* ekmurmuris ĉirkaŭ li, ĉar li diris: Mi estas la pano, kiu descendis de la ĉielo. 42 Ili diris: Ĉu tiu ĉi ne estas Jesuo, la filo de Jozef? Liajn gepatrojn ni ja konas, ĉu? Kiel li do povas aserti: Mi descendis de la ĉielo? 43 Jesuo respondis al ili: Ne murmuru inter vi. 44 Neniu povas alproksimiĝi al mi, krom se la Patro, kiu min sendis, altiras lin. Kaj je la lasta tago mi starigos lin. 45 Estas skribite ĉe la profetoj: *Ĉiuj estos instruitaj de Dio*. Nu, ĉiu kiu aŭskultis la Patron kaj lernis de Li, venas al mi. 46 Ne, ke iu vidis la Patron: nur kiu venas de Dio, nur tiu vidis la Patron. 47 Vere, mi certigas vin: Kiu fidas, tiu havas eternan vivon. 48 Mi estas la pano de la vivo. 49 Viaj gepatroj manĝis en la dezerto la manaon, sed ili mortis. 50 Sed tio ĉi estas la pano, kiu descendis de la ĉielo: kiu manĝas el ĝi, tiu ne mortos. 51 Mi estas la viva pano, kiu descendis de la ĉielo. Kaj kiu manĝas de tiu ĉi pano, tiu vivos en eternon. Kaj la pano, kiun mi donos, estas mia karno, pro la vivo de la mondo.

**L**a plejparto de niaj eklezioj dividas la samajn legaĵojn por dimanĉo. La teksto kiun ni legis kaj pri kiu mi predikos estas la teksto por hodiaŭ. Mi ne elektis ĝin, nek evitis ĝin.

Ni unue rigardu al la kunteksto. En la antaŭaj ĉapitroj oni renkontis la samarianinon ĉe la putro, la resanigitan filon de la Romia oficiro kaj tiun de la paralizulo en Betesda, kaj ĉefe la multobligon de la 5 hordeaj panoj kaj de la du fiŝoj kaj post tio Jesuo paŝis sur la maro. En la posta ĉapitro Jesuo iras al

Jerusalemo. Tion ĉi ni ne devas konservi en la memoro kiam ni legas la perikopon.

En la unua versiklo de tiu peco oni trovas la vorton: la Judoj. Oni devas eviti grandegan miskomprenon. Tute ne temas pri la hodiaŭaj Judoj. La nuna judismo naskiĝis preskaŭ samtempe kiel kristanismo. Fakte, ili fariĝis du branĉoj kiuj venas el la trunko de la popolo de Dio. Ili ambaŭ estas heredantoj de la promesoj de Dio.

Plejofte en la Nova Testamento, kiam oni parolas pri la Judoj, oni volas indiki

---

Rimarko: La citaĵo el la evangelioj estas laŭ la traduko de Gerrit Berveling, en kiu li ekuzis la formon Judajo kaj la formon Judajaj por la tieaj homoj, por substreki, ke la tensioj en ekzemple la evangelio laŭ Johano ne temas pri tensio inter kristanismo kaj judismo, sed inter nordaj (Galileaj) kaj sudaj (Judajaj) Judoj.

En la prediko Philippe Cousson uzas la tradukon de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo.

la loĝantojn de Judujo, en komparo kun la Galileanoj, kiel estis Jesuo kaj liaj disĉiploj. Ankaŭ la esprimo portas la signifon de la ĉefoj de la popolo en Jerusalemo. En malfrujaj tekstoj kiam jam estis malpaco kun la sinagogoj, la termino rilatas al tiuj tiamaj malpacoj. Sed, ĉi tie, ni troviĝas en Galileo, ĉu apud la maro, ĉu en sinagogo, ne estas klare, sed certe en Galileo. Tiuj “Judoj” povas esti plej verŝajne la ĉefoj de la loka sinagogo. Ne estas Judujanoj ĉar ili diras ke ili konas Jesuon kaj lian familion.

Ĉiuj izraelidoj bone konis la skribaĵojn, Torao, profetoj kaj skriboj. Tiu hodiaŭa rakonto aludas al pluraj pecoj el ili, kiun ni devas ne lasi flanken.

La unua evidenta biblia kunteksto estas la disdono de la manao en la dezerto dum la eliro el Egiptio al la promesita tero. Dum tiu epizodo, la popolo murmuris, eĉ plurfoje.

Ne nur la libroj Eliro, Nombroj kaj Readmono parolas pri la afero, sed ankaŭ la 78a psalmo, kaj ĉi tiu gravas por kompreni la hodiaŭan tekston. Ĝi parolas pri la greno kiu venas el la ĉielo, kaj pri la pano kiun ili manĝis.

Lige kun la antaŭa teksto en Eliro kaj aliaj versikloj de la sama psalmo, estas ankaŭ paralela la rakonto du ĉapitrojn pli frue pri la Samarianino. Ĝi same rilatas al la eliro tra la dezerto, sed ĉefe ĝi helpas kompreni kion povas signifi manĝi kaj trinki ankaŭ en nia teksto. En Meriba, la popolo same murmuris, grumblis.

Mi volas noti ion pli en la 4a ĉapitro de la evangelio, kiam li parolas al la disĉiploj kiuj revenis de aĉetado en la

vilaĝo. Mi legas la versiklon 34: “*Mia nutraĵo estas plenumi la volon de Tiu, kiu min sendis.*” Kelkajn versiklojn pli frue, li diris al la Samarianino: “*La veraj adorantoj adoras la Patron laŭ spirito kaj vero.*”

El tio, do, kion povas signifi “manĝi la panon de vivo” se ne spirite partopreni en la vivo kaj la morto de Jesuo, se ne plenumi la volon de Dio, se ne signifas ne indulgi sian vivon. Ĉar nur tiu spirita nutraĵo povas nutri kaj vivigi, ĉar nur tiu viva akvo povas sensoifigi.

Ĉu vi fidas Jesuon? Ĉu vi fidas Dion? Ĉu vi kredas? Tiu kiu kredas havas eternan vivon. Bonvolu noti ke ne estas skribite ke li ricevos eternan vivon, sed havas eternan vivon, ekde nun. La spirita mondo estas jam tiu de la kredanto. Kaj kredi estas donata de Dio. Neniu povas veni al Jesuo se Dio ne tiris lin. La spirita vivo estas ricevita, ricevata. Kaj en la lasta tago, tiu estos levata de Jesuo. La savo estas kaj nuna, kaj apartenas al la alia mondo, al alia tempo, en la lasta tago.

Kaj el tiu alia mondo venas Jesuo. Tion li ripetas multfoje en tiu ĉapitro.



Li estas la pano, kiu malsupreniris el la ĉielo kaj kiun li donas. Oni manĝu tiun panon kaj ne mortu kaj vivu eterne, por la alia mondo.

Tiu Jesuo, kiu venis el la alia mondo, la alia eono, la spirita mondo, venis en la karnon por doni sian karnon por la vivo de la mondo.

Li donis sian karnon por la vivo de tiu nia mondo, por ĝia savo.

Kaj li, la viva pano, estas donita por la spirita mondo, por eterneco.

Por bone kompreni tion, mi volas citi kaj komenti la versiklon 35 de la sama 6a ĉapitro de Johano. *”Mi estas la pano de vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi tiu neniam soifos.”* Oni klare vidas ĉi tie ke ne temas pri manĝenda materia pano. Neniam malsatos tiu kiu venas al Jesuo. Neniam soifos tiu kiu kredas al li. Same ne temas pri fizika malsato, nek pri fizika soifo. La pano kiu estas Jesuo, la fonto de vivakvo kiu li estas, ili nutras la spiriton, ili sensoifigas la animon.

En tio oni povas klare vidi en tiu rakonto la apudmeton de du realaĵoj, la materia kaj la spirita.

Materie, Jesuo estas konata kiel la filo de Jozefo kaj Maria.

Spirite, li estas la Filo de Dio. En tiu perikopo estas la unua el la serio “mi estas”, *Ego eimi*, kio rekte rilatas al la nomo mem de Dio.

Materie, estis la manao en la dezerto, la pano kiu ne malhelpis la morton.

Spirite estas la pano de vivo, kiu estas Jesuo, kiu provizos la eternan vivon, la spiritan vivon.

Materie estas la akvo el la roko en Meriba, por ke la popolo trinku.

Spirite estas la fonto de viva akvo, por ke ĉesu la spirita soifo, por ke fluu la vivakvo el la kredanto.

Mi ne parolis pri materia eventuala ĉeesto de la karno de Jesuo en la pano dum la cerebro, ĉar tiu teksto ne parolas pri ĉi tio.

Por konkludi, mi prunteprenos tekstojn de Gigo la dua, la Kartuzano, kiu vivis en la 12a jarcento. Li estas tiu monaĥo kiu difinis la 4 tempojn de la *“lectio divina”*. Tiuj citaĵoj venas el unu el liaj meditadoj.

La parto de fido, kiun vi ricevis, estas kiel la malgranda panpeco en via buŝo. Sed se vi ne meditas ofte kaj pie tion, kion vi kredas, se vi ne iel maĉas ĝin, knedante ĝin kaj turnante ĝin per viaj dentoj, tio estas per la sentoj de via menso, ĝi ne transiros la gorĝon, tio estas, ke ĝi ne atingos vian inteligentecan. Per la inteligenteco, la spirita nutraĵo pasas en la tuŝitecon de la koro, por ke vi ne neglektu tion, kion vi komprenis, sed ke vi zorgeme kolektu ĝin per la amo. Vane vi komprenis, se vi ne amas tion, kion vi kaptis, ĉar saĝo estas en amo. Inteligenteco antaŭas la spiriton de saĝo kaj gustumas nur transire; Sed la amo ŝatas tion, kio daŭras.

Spirite manĝi la korpon de Kristo estas do havi en li puran fidon, serĉi la enhavon de ĉi tiu fido per fervora kaj diligenta medito, trovi per inteligenteco tion, kion ni serĉas, arde ami tion, kion ni malkovris. imiti laŭ nia eblo tiun, kiun ni amas, aliĝi al li senĉese imitante lin kaj per ĉi tiu aliĝo atingi eternan kuniĝon.

Amen.

# Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

Unua parto

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

**K**iam ni eniras en katolikan preĝejon, ni povas vidi skulptaĵojn kaj pentraĵojn pri gravuloj de kristanismo. Sed kiel oni sciuj, kiu estas sur la pentraĵo aŭ kiun formas la skulptaĵo? En tiu helpas al ni la atributoj!

En la ikonografio oni nomas atributoj tiujn simbolajn objektojn, eble homan aŭ bestan figurojn, kiuj helpas rekoni kaj kompreni la prezentitan homon.

Plej ofte tiuj atributoj estas en la mano de la prezentita homo, aŭ ĉe la flanko, aŭ ĉe siaj piedoj, kaj ĉiam aludas pri iu grava okazaĵo en la vivo de la prezentita homo, aŭ pri lia martireco. Tial elformiĝis tiu ĉi interesa simbol-lingvo, ĉar en la malnovaj tempoj la plej multaj

homoj ne povis legi, do estus vane skribi la nomojn de la sanktuloj. Per iliaj atributoj oni povis rekoni ilin.

Laŭ la kristana tradicio ni nomas “Dek du apostoloj” tiujn virojn, kiujn Jesuo Kristo elektis kiel disĉiploj kaj donis al ili mision.

La vorto venas el la greka vorto *ἀπόστολος* [apostolos], kiu signifas delegito. La greka vorto venas el la verbo *apostello*, kiu signifas elsendi, forsendi.

Ni legas ĉe Sankta Mateo (10,2–4 laŭ la traduko de Gerrit Berveling):

*“La nomoj de la dek du apostoloj estas: kiel unua Simono, alinome Petro, kaj Andreo lia frato, kaj Jakobo de Zebedeo kaj lia frato Johano, Filipo kaj*



*Bartolomeo, Tomaso kaj Mateo la impostisto, Jakobo de Alfeo kaj Tadeo, Simono la Kanaanano kaj Judaso Iskariot, kiu transdonis lin”.*

Ni legas en la Agoj de apostoloj (je la fino de 1,20) pri Judaso Iskariot: “*Lian oficon transprenu iu alia*”.

Kaj poste (1,21–26): “*El tiu viroj, kiuj kuniradis kun ni la tutan tempon dum la Sinjoro Jesuo estis ĉe ni, ekde la bapto de Johano ĝis la tago, kiam li estis forprenita de ni, <el tiuj do> unu devas kune kun ni fariĝi atestanto pri lia resurekto. Kaj oni proponis du <personojn>: Jozef kun la kromnomo Barsabas, ankaŭ nomata la Justa, kaj Matias. Ili jene preĝis: Sinjoro vi konas ĉies koron: montru kiun el ĉi du vi elektis por transpreni la lokon en ĉi apostola*

*servado, kiun forlasis Judaso por iri sian vojon. Kaj oni lotumis inter ili, kaj la loto indikis Matiason, kaj tiel li alkalkuliĝis al la dek unu apostoloj”.*

Tamen ni tre malofte povas renkontiĝi kun Matias – kvankam ofte ni povas vidi kune dek du pentraĵojn aŭ skulptaĵojn. Do kiu estas en la dekdua loko?

Estas multaj, kiuj pensas, ke post la rapida “homa” agado de la apostoloj (tuj re-plenumi kaj nepre la dek du), okazis “Dia” elekto! Sur la damaskusa vojo... Kie mem Jesuo elektis sian dekduan apostolon, Paŭlon.

Tion mi mem ne povas prijuĝi, sed tio estas certa, ke plej ofte inter la dek du estas montrita Paŭlo (kaj ne Matias).

## Petro

La atributo de Petro estas la ŝlosilo, pro tio, kion ni legos ĉe Sankta Mateo 16,19: “*Mi donos al vi la ŝlosilojn de la Regno de l’ ĉieloj; kaj kion vi ligos surtere, tio estos ligita ankaŭ en la ĉieloj; kaj kion vi malligos surtere, tio estos ankaŭ malligita en la ĉieloj.*”

Laŭ la katolika tradicio li estis la unua episkopo de Romo.

Lia origina nomo estis Simon, kiu signifas hebree atento, observado, aŭskulto, aŭskultado. Poste Jesuo donis al li la nomon Petro, kiu venas el la greka vorto Petros, kiu signifas rokon, rokaĵon.

Apostolo Paŭlo ofte nomas Petron Kefa, ĉar en la aramea lingvo tiu ĉi vorto signifas rokon.



Baziliko Sankta Johano de Laterana en Romo  
Giuseppe Mazzuoli (1644–1725)

Oni opinias, ke li estis la plej signifa, grava apostolo.

Post la morto de Jesuo li fariĝis gvidanto de la tiama kristana komunumo, religio. Laŭ la katolika eklezio Petro estas la (defenda) sanktulo de la papoj, la fiŝistoj kaj Romo.

Petro devenas el Betsaida, kaj en la tempo de Jesuo Kristo li vivis en Kafarnaon kun la frato, Andreo. Li havis edzinon, sed pri infanoj ne ekzistas fidebla dokumento.

Li kaj lia frato estis fiŝkaptistoj. Iam, kiam ili elĵetis sian reton, Jesuo petis ilin, ke ili estu liaj disĉiploj. Petro fariĝis lia plej fervora disĉiplo.

Pri lia vivo pluraj variantoj troviĝas en la katolika tradicio.

Ekzistas fonto, laŭ kiu li post la morto de Jesuo iris al Antiokio kaj tie fondis episkopecon, laŭ aliaj fontoj li estis ankaŭ en Korinto.

Preskaŭ ĉiuj tradicioj samopiniias pri tio, ke lia konvertiga laboro estis kronita en Romo. Laŭ la tradicio en Romo li fondis la institucion de la papo.

Ankaŭ pri lia morto estas pluraj variantoj. Tio estas certa, ke dum la regado de cezaro Nero li estis ekzekutita pro sia kredo kaj la misia laboro kaj li mortis kiel martiro.

Estas fonto laŭ kiu li estis krucumigita, sed pro lia peto oni krucumigis lin per la kapo malsupren, ĉar li ankaŭ en la morto ne volis meti sin samnivele kun Jesuo.

Pro la respekto pri Petro ĉiuj papoj portas la Ringon de la Fiŝisto, sur kiu estas Sankta Petro, kiu ĵetas reton el sia boato.



En la preĝejo de la vilaĝo Habo en suda Svedio. Nekonata skulptisto, ĉirkaŭ 1723



Peter Paul Rubens (1577-1640)  
inter 1610 kaj 1612



Marco Zoppo (1433-1498)  
ĉirkaŭ 1468





18an - 25an de  
januaro 2019

PREĜO-SEMAJNO  
POR LA UNUECO  
DE LA KRISTANOJ  
2019

Ĵus pasis la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj (kaj tio en la norda Ĥemisfero, dum en aliaj regionoj oni solenos ĝin en aliaj datoj, ekzemple je Pentekosto). Laŭ bela tradicio, ankaŭ ĉi-jare eblas legi la tradukon de la tekstoj proponitaj por la ĉiutagaj meditoj (verko de la indoneziaj Eklezioj).

La tradukon realigis denove internacia grupo, kunordigita de la vicprezidantino de IKUE Marija Belošević. Dankegon al ili!

Oni povas libere deŝuti la tekstojn per tiu ĉi ligo:

<http://www.ikue.org/ekumenismo/preghosemajno/semajno2019.htm>

Sekve la enkondukaj vortoj pri la ĉi-jara temo.

## Enkonduko al temo por la jaro 2019

Ĉiujare kristanoj tra la mondo unuiĝas preĝe por la kreskado de la unueco. Ni faras tion en la mondo, kie korupto, monavideco kaj nejusteco kuntrenas malegalecon kaj dividon. Nia preĝo estas preĝo por la unueco en mondo frakasita: kaj tio estas ago potenca. Sed tamen, kiel individuoj kaj komunumoj kristanaj, ni kelkfoje estas komplikaj en nejusteco kaj, pro tio, ni estas kunvokitaj doni kune ateston favore al la justeco kaj esti iloj por la

resaniĝanta graco de Kristo antaŭ la frakaso de la mondo.

La Preĝsemajno por la Unueco de Kristanoj en 2019 estas preparita de la kristanoj en Indonezio. Kun 265 milionoj da homoj, el kiuj 86 % konsideras sin esti islamanoj, Indonezio estas bone konata kiel la lando, kiu havas la plej grandan popolon islaman. Sed tamen, 12 % el la indonezianoj estas kristanoj el variaj tradicioj. Se oni konsideras kaj la popolon kaj la grandan

amplekson de tero, Indonezio estas la plej granda lando en sudokcidenta Azio. Ĝi havas pli ol 17.000 insulojn, 1.340 malsamajn etnajn grupojn kaj pli ol 740 tieajn lingvojn, sed eĉ tiel ĝi estas kunigita en ties pluraleco per la nacia lingvo *Bahasa Indonezia*. La lando baziĝas sur kvin principoj nomataj *Pankazila*<sup>(1)</sup>, kies moto estas *Bhineka Tunggal Ika* (Unueco en la Diverseco). Meze de la diverseco de etnoj, lingvoj kaj religio, la indonezianoj estas vivintaj per la principo de *gotong rojong*, kio estas vivi en solidareco kaj kunlaborado. Tio signifas specon de komuneco en diversaj kampoj de vivo, en laboro, en malĝojoj kaj en festadoj, rigardante ĉiujn indonezianojn kiel fratojn kaj fratinojn.

Ĉi tiu ĉiam malfortika harmonio estas hodiaŭ minacata en novaj manieroj. Tre multe el la ekonomia kreskado, kiun Indonezio estas spertinta dum antaŭnelongaj jardekoj, estas konstruita per sistemo centrita en konkurenco. Ĉi tio alfrontas rekte la kunlaborecon antaŭvidintan per *gotong rojong*. La koruptado estas spertita multmaniere kaj infektas la politikon kaj la entreprenojn, ofte donante ruinigajn konsekvencojn por la medio. Aparte, la koruptado malfortigas la justecon kaj la leĝaplikadon. Tre ofte, kiuj devus supozeble promocii la justecon kaj protekti la malfortulojn, tiuj faras ĝuste la malon. Konsekvence, la distanco inter riĉuloj kaj malriĉuloj grandiĝas kaj, tiel, lando tiom riĉa pri mediaj rimedoj havas la skandalon de

multaj homoj vivantaj en malriĉeco. Okazas laŭ la tradicia indonezia proverbo: “Muso mortas malsate ene de grenejo rizplena“. Dume, apartaj etnaj kaj religiaj grupoj estas ofte asociitaj al riĉeco tiel, ke tensioj aperadas. La radikaligo, kiu ĵetas komunumon kontraŭ la alia, kreskiĝas kaj senkreditigas kelkajn el ili pro la malbonuzado de la amaskomunikiloj.

Kristanaj komunumoj en tia medio fariĝas, novmaniere, konsciaj pri sia unueco kiam ili dividas komunan zorgon kaj serĉas komunan respondon al nejusta realaĵo. Samtempe, antaŭ tiaj nejustecoj, ni estas devigitaj, kiel kristanoj, ekzameni la situaciojn, en kiuj ni fariĝis komplikoj. Nur donante plenan atenton al la preĝo de Jesuo “por ke ili estu unu“ ni povas atesti la vivadon de unueco en la diverseco. Per nia unueco en Kristo, ni kapablos kontraŭi la nejustecon kaj respondi al la bezonoj de viktimoj.

Movitaj de ĉi tiuj konsideroj, la indoneziaj kristanoj sentis, ke la vortoj de Readmono – “*Justecon, justecon sekvu*“ (v. Rea 16,18-20) – parolis forte pri iliaj situacio kaj bezonoj. Antaŭ ol eniri la teron, kiun Dio promesis doni al ili, la popolo de Dio renovigis sian sindevigon kun la Alianco, kiun Dio estis farinta kun ili. La biblia citaĵo venas el ĉapitro, kies centra temo rilatas al la festadoj celebrotaj de la Alianca popolo. Post ĉia festo, la popolo estas orientita: “*Kaj estu gaja en via festo, vi kaj via filo kaj via filino kaj via servanto kaj*

---

1) La kvin principoj de Pankazila estas: (1) Kredo en ununura Dio; (2) Homaro justa kaj civilizita; (3) La unueco de Indonezio; (4) Demokratio gvidita per saĝeco interna kaj unueco alveninta el komuna decido inter la reprezentantoj; (5) Socia Justeco por la tuta popolo de Indonezio.

*via servantino, kaj la Levido kaj la fremdulo kaj la orfo kaj la vidvino, kiuj estas en viaj pordegoj*“ (Rea 16,14; v. ankaŭ 16,11). Indoneziaj kristanoj esperas revivigi tiun saman spiriton de festadoj, kiu inkluzivigas ĉiujn en iliaj komunumoj, en kiuj ili antaŭe jam estis vivintaj. Je la fino de ĉi tiu longa ĉapitro povas esti strange, ke du versikloj rekomendas la establilon de juĝistoj, sed en ĉi tiu indonezia kunteksto la ligilo inter festoj kaj justeco al ĉiuj fariĝas tre vivanta. Kiel popolo de la Alianco establita en Jesuo, ni scias, ke la ĝojoj de la ĉiela bankedo estos donitaj al tiuj, kiuj havas malsaton kaj soifon kaj estas persekutitaj pro justeco “*ĉar ilia estas la Regno de la ĉielo*“ (Mat 5, 6-10).

La Eklezio de Kristo estas vokita fariĝi specimeno de ĉi tiu Regno. Tamen, pro nia senunuco, ni malsukcesadas.

Ni ĉesas esti signo de la amo de Dio al lia popolo. Sammaniere, ĉar la nejusteco pliigis la dividojn, kiuj atingis la indonezian societeton, ĝi ankaŭ nutris dividojn en la Eklezio. Ni pentas pri la nejusteco, kiu kaŭzas dividon, sed tamen, kiel kristanoj, ni ankaŭ kredas je la potenco de Kristo por pardoni kaj sanigi. Kaj tiel, ni renkontiĝas kunigitaj sub la kruco de Kristo, petante al Li kaj de Li la gracon por finigi la nejustecon kaj lian kompatemon antaŭ la pekoj, kiuj kaŭzas nian dividon.

La pripensoj por la ok tagoj kaj la celebros estos fokusigantaj la elektitan temon. Por profundigi nian pripenson pri la unueco kaj justeco, la ĉiutaga temo estis zorge elektita por prezenti la necesajn luktojn kontraŭ la nejusteco.

La temoj dum la preĝosemajno:

Tago 1-a: Sed justeco fluu kiel akvo (Amo 5,24)

Tago 2-a: Sed via parolo estu: Jes, jes, ne, ne. (Mat 5,37)

Tago 3-a: Kompatema kaj favorkora estas la Eternulo (Psa 145,8)

Tago 4-a: Estu kontentaj je tio, kion vi havas (Heb 13,5)

Tago 5-a: Bonanonci al malriĉuloj (Luk 4,18)

Tago 6-a: Eternulo Cebaot (de la armeoj) estas Lia nomo (Jer 10,16)

Tago 7-a: Ho virino, granda estas via fido (Mat 15,28)

Tago 8-a: La Eternulo estas mia lumo kaj mia savo (Psa 27,1)

## Kelkaj gravaj ŝlosilaj datoj en la historio de la preĝosemajno por la unueco de la kristanoj

ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj

1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis “Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito” [Hints for the outpouring of the Spirit]

1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas “Unuiĝon de preĝado por Unueco”

- 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- 1908: Unua okazigo de la "Preĝosemajno por la unueco de Eklezio" en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- 1926: La Movado "Fido kaj Konstitucio" komencas publikigon de "Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj" okaze de Pentekosto
- 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por "unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras"
- 1941: Komisiono "Fido kaj Konstitucio" translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- 1958: La Ekumena centro "Kristana unueco" el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono "Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo "ke ĉiuj estu unu"(Joh 17, 21)
- 1964: La "Dekreto pri ekumenismo" de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- 1966: La Komisiono "Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- 1968: La unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis "Fido kaj Konstitucio" kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
- 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono "Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- 2008: En la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

# Morto de la naciismo

Artikoleto verkita de Endre ADY (†1919)

Tradukis Vilmos BENCZIK, HU

**A**ntaŭ 100 jaroj Endre ADY mortis. Depost Sándor Petőfi li estis la plej granda hungara poeto, kaj lia verkaro atingas mondliteraturan nivelon. Li havas dudek naŭ jarojn, kiam per la poemaro Novaj poemoj li elbatalas por si lokon en la elito de la hungara literaturo. En lia poezio aperas harmonie la tradicirespekta konscio pri hungareco kaj la pretendo de moderneco, spertita kaj komprenita en Parizo.

Liaj poemoj elvokas vervajn reagojn el ĉiuj: li havas adorantojn kaj ardajn malamikojn. La ĉi-lastaj akuzas lin pri senhungareco kaj nekomprenebleco, sed ADY neŝanceble trairas la vojon, kiun lia talento montras al li. La plimulto de liaj poemoj aperas en la revuo Nyugat [Okcidento], startanta en 1908: tiu revuo estis la lulilo de la hungara moderna literaturo. ADY estis ankaŭ tre bona novelisto, kaj eble la plej eminenta – kaj krome tre fekunda – ĵurnalisto de sia epoko. Kun netrompebla politika sento li rekonas kaj varme subtenas ĉiun progreseman aferon; kiel Bernard Shaw en Britio kaj Romain Rolland en Francio, li protestas kontraŭ la milito jam ĉe ties eksplodo, kiam ankoraŭ eĉ la kremo de la hungara intelekta vivo estis erarigita fare de la naciisma propagando. Li estis grandulo de sia epoko, ne nur kiel poeto, sed ankaŭ kiel pensulo kaj homo. [Kaj liaj pensoj estas daŭre aktualaj].

el Hungara Antologio

**O**ni ne bezonas esti Matusalemo por povi ĝisvivi certan belegan ĉi-teran okazaĵon, ĝojindan forpason. Nia Eŭropo, mokata maljuna, sed fakte ĉiam pli juniĝanta, forpelas finfine abomenindan inkubon desur sia brusto: la naciismon.

Mi nomis ĝin inkubo, sed ĝi estas pli ol inkubo. Ĝi estas unu el la plagoj de la homaro. Ĝi estas iaspeca parazita kreskaĵo de la homa kulturo, kiu ŝovas siajn radikojn tre profunde en la grundon sub la fifamaj ŝimaj palacoj en Romo, Tibeto, Moskvo, Istanbulo kaj aliaj landoj. Ĝi sufokas kaj murdas per siaj milope multaj brakoj.

Kiom da historiaj maljustaĵoj jam

okazis per ĝi! Kunbataligo de popoloj, lum-estingo, surtreto de la libero. Estas mirinde, ke la homaro atingis tiom, kiom ĝi efektive atingis.

Elokventaj, grandaj signoj nun anoncas, ke alvenis la tempo de ĝia likvido. Ĉie, kie la progreso ne estas nura kliŝa slogano, la popolo kun lumiganta animo jam prepariĝas fortamane elŝiri el la herbario de la homaro tiun ĉi venenan, parazititan kreskaĵon.

La naciismo estas furioza patriotismo. Eĉ ne tio. Kvankam la nomo “patrioto” estis jam multfoje kompromitita, tamen ĝi estas ankoraŭ ŝildo de pli sankta nocio, ol ke ĝi povu uziĝi por etikedi la naciismon. La naciismo ne

estas patriotismo. La patriotismo estas tia *sine qua non* [latine: neevitebla kondiĉo] de la homo kaj socio, ke ĝin eĉ ne necesas koncizigi nocio, kaj ne necesas serĉi vorton por ĝi. Ĝi koncernas la honestajn laborantajn homojn, kiuj, vivas en komuna kulturo kaj agas en komuna socia laboro. Patriotoj ili estas, se oni volonte uzas tiun vorton. Kaj kiuj estas malamiko de la progreso, de la strebado por pli bona mondo, de senkondiĉa libero por la homa intelekto, tiuj estas perfidantoj de la patrujo, eĉ se ili kantadas senĉese la nacian himnon.

La mondo staras antaŭ baldaŭa senmaskigo de praa mistifiko. Ne estas hazardo, ke Pobedonoscev [rusa politikisto kaj juristo, †1907] falas desur la ĉefprokurora trono, kaj ke la tria franca respubliko, kiel giganto, ĝuste nun mortotretas konspirantan Bonapartistan formikaron, bazintan siajn esperojn en la naciismo. Kaj la laborula Germanio same nun deklaras denove, ke ĝi ne pretas apogi cezarajn frenezajojn, prezentatajn sub la ŝildo de furioza patriotismo. Kiel same nun avertas sian popolon la granda [norvega] verkisto Björnsterne Björnson, ke ĝi ne lasu misgvidi sin far la apostoloj de naciismo disde la vera progreso kaj kultura evoluo. La mondo plenplenas je grandiozaj antaŭsignoj. Ni vidas la agonion de la naciismo.

La naciismo probable plej bone observeblas en la nigra, sed ne sekreta, anima de Pobedonoscev. Li ne surmetis maskon. Li malbenis la liberon, la kulturon. Li estas pli ultramontana, ol la papoj de la mezepoko. La mondo apartenu al la caro, al la pastroj de la

vera religio kaj al la slava hordo. Prefere estu milito kaj pesto, ol la popolo pensu kaj volu.

Tia estas la kruda tipo. Pli sincera, ol la Dalai-lamao, ĉiukaze multe pli sincera, ol imperiestro Vilhelmo, generalo Galifet [franco, †1909] aŭ Dérouléde [franca politikisto, †1914]. Kiel la homaj socioj evoluis laŭ diferencaj vojoj, tiel ŝangis sian fizionomion ankaŭ la naciismo. Ĝi stultigas Otomanon en la nomo de Alaho, ebrigas francon per *gloire*, vekas malamon kontraŭsvedan en norvego, kaj volas revigi pri pangermanismo germanon. Kaj en la socioj, en kiuj kunvivas pluraj nacioj, zorgas pri aparta naciismo por ĉiu el ili tiuj, kiuj estas interesitaj ke la oligarkio floru en sia malnova aŭtoritato kaj laŭ la malnova maniero. Ĉar la naciismo taŭgas unuavice por tio, ke la amaso, ebrigiĝinta per ĝi, ne rimarku, kio mankas al ĝi, kaj por kio ĝi havas rajton. En Francujo jam estus malebla la brutala sincero Pobedonosceva. Tie la ultramontanoj batas al si la bruston kiel respublikistoj. Ili eĉ flirtas kun la liberpensado. Sed ĉiu naciismo esence havas la samajn radikojn. Kaj se ni emus ironii, ni povus diri, ke ne ekzistas pli internacia forto kaj ideo, ol la naciismo.

La popoloj jam komencas vidi per la okuloj, kaj se tie kaj tie Eŭropon foje-foje superregas naciisma konvulsio, ĝi estas nura horeo. La naciismo baraktas kontraŭ la likvidiĝo. Eble jam baldaŭ en la mondo ne plu devos honti la veraj patriotoj. Eĉ en Ruslando la likvido komenciĝis. Kaj ĉe ni – kiom longe tio malfruos?



# Siegfried Krüger honora membro en BAVELO

**N**ia multjara estrarano kaj antaŭa kasisto, Siegfried KRÜGER, iĝis en 2018 honora membro en BAVELO (mallongigo de Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo).

Laŭ la diplomo Siegfried honoriĝis “pro sia multjara eksterordinara laboro por la prospero de la internacia lingvo Esperanto, precipe en Baden-Virtembergo”.

BAVELO ekzistas de post 1982 kun la ĉefa celo subteni lokajn agantojn en la tuta federacia lando. Por ebligi interkontakton, BAVELO proponas regulajn renkontiĝojn, disvastigon kaj interŝanĝon de informoj. En 2001 establiĝis intensa kunlaboro kun la najbara orientfranca asocio, kiu kondukis al regulaj komunaj aranĝoj.

Vizitu la ttt-ejon de BAVELO:

<https://esperanto-bw.de/pages/eo/cefpago.php>



Kelkaj membroj de la unua estraro de BAVELO. Siegfried KRÜGER en la mezo. /Wikipedia



Siegfried Krüger ricevas la diplomon



La diplomo

# Kristana Kongreso 2019 en Révfülöp

## Ekskursprogramero

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

**S**omere ni havos nian kongreson en Hungario, en Révfülöp (apud la lago Balatono) inter 10a kaj 17a de aŭgusto.

Multaj interesaj vidindaĵoj situas en la proksimeco, kaj estas malfacile elekti, kion mi montru al vi dum nia kongreso – sed sendube mi ŝatus prezenti al vi dum la tuttaga ekskurso la urbon KESZTHELY, kaj tie unue la kastelon de la FESTETICS-familio.

La grafoj Festetics estis progresemaĵ ter-posedantoj: ili fondis hospitalon, establis lernejon en la urbo kaj en 1797 György Festetics (agronomo) malfermis agrikulturan altlernejon Georgikon, kiu estis la unua tiaspeca en Eŭropo.

En 1739 Kristóf Festetics aĉetis kampojn sed la konstruado komenciĝis nur en 1745 kaj daŭris pli ol jarcenton. La plej menciinda arkitekto estis Viktor Rumpelmayer. Inter 1799 kaj 1801 György Festetics konstruis librejan alon, kie estis establita biblioteko. Inter 1883–1887 okazis la lasta konstruado. La turo kaj aliaj partoj estis konstruitaj.

Dum la 2-a mondmilito la kastelo mem ne difektiĝis, sed poste, en la malstabila periodo, parto de la meblaro malaperis. En 1945 en la kastelo sovetia milithospitalo funkciis, poste ĝi estis hungara kazerno, baldaŭ studenta kolegio, samtempe urba biblioteko kaj muziklernejo. Ekde 1974 muzeo funkcias interne.





Mem la kastelo, la salonoj de la kastelo estas ege belaj kaj imponaj, sed estas ankaŭ interesaj ekspozicioj en ĝi, ekzemple pri kaleŝoj, kaj pri la maniero kiel vojaĝis niaj antaŭuloj.

Ankaŭ estas belega palm-domo kun birda parko en la parko de la kastelo.

Ne nur en la kastelo troviĝas interesaj ekspozicioj, en la urbo Keszthely funkcias ekzemple vere interesa muzeo de muzik-maŝinoj kaj fonografoj! Aŭ pri vinproduktado! Aŭ pri marcipano!

Pli detalojn mi ne diras – vi aliĝu al la kongreso, venu al Hungario, kaj vidu tiun ĉi belegan lokon per viaj propraj okuloj!



(Detalojn pri la kongreso kaj aliĝilon vi trovas en la numero 5/2018 de Dia Regno. Aliĝilo troviĝas ankaŭ surrete: <http://keli.chez.com/index.htm>)



## Kristana Kongreso 2019 en Révfülöp

### Listo de aliĝantoj ĝis la 25a de januaro 2019

- |                                |          |                            |          |
|--------------------------------|----------|----------------------------|----------|
| 1. Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS       | Hungario | 12. Gabriella STIER        | Rumanio  |
| 2. Bengt Olof ÅRADSSON         | Svedio   | 13. Oldřich Arnost FISCHER | Ĉeĥio    |
| 3. André ÅRADSSON              | Hungario | 14. Václav POSPÍŠIL        | Ĉeĥio    |
| 4. Pavel POLNICKÝ              | Ĉeĥio    | 15. Štěpán POSPÍŠIL        | Ĉeĥio    |
| 5. Samuel GAILLARD             | Francio  | 16. Šimon POSPÍŠIL         | Ĉeĥio    |
| 6. Philippe COUSSON            | Francio  | 17. Mária LÁSZLÓ           | Hungario |
| 7. Margit-Judit OLAH           | Rumanio  | 18. Terézia Ildikó SCURT   | Rumanio  |
| 8. Eugenia-Ecaterina POPOVICIU | Rumanio  | 19. Endel OJASILD          | Estonio  |
| 9. Antal FARKAS                | Rumanio  | 20. Joonatan OJASILD       | Estonio  |
| 10. Szabolcs BIRTA             | Rumanio  | 21. Hanna CAYZAC           | Francio  |
| 11. Sieglinde STAMM            | Aŭstrio  | 22. Norbert SÜDLAND        | Germanio |

# Granda studo 2018: Antisemitismo kreskas en EU

## Raporto farita de EŬROPA AGENTEJO PRI FUNDAMENTAJ RAJTOJ

El sveda gazetartikolo adaptita de Bengt Olof ÅRADSSON, SE

**N**aŭ el dek eŭropaj judoj sentas, ke antisemitismo pliiĝis dum la lastaj kvin jaroj.

La Eŭropa Agentejo pri Fundamentaj Rajtoj, prezentis en decembro 2018 la plej grandan enketon realigitan en la mondo, pri kiel judaj civitanoj sentas, sin esti traktataj pro sia etno.

La studo baziĝas sur reta enketo, kiun respondis pli ol 16,000 judoj en dek du EU-landoj. En tiuj pli ol 96 % de la juda loĝantaro en EU vivas. Ĉirkaŭ 90 % de tiuj, kiuj respondis al la enketo, sentas, ke antisemitismo pliiĝis dum la lastaj kvin jaroj.

La 20-a jarcento havis multajn malsanojn. La sola, kiu ankoraŭ estas nekuracebla, estas antisemitismo. Ni

rimarkas ĉi tion hodiaŭ, diris Frans Timmermans, vicprezidanto de la Eŭropa Komisiono kiam li prezentis la raporton en decembro 2018.

Kompare kun simila studo farita antaŭ kvin jaroj, pli granda proporcio, el tiuj kiuj respondis la nunan demandaron, diras, ke antisemitismo estas tre granda aŭ sufiĉe granda problemo. En ĉi tiu kazo elstaras tri landoj – Svedio, Britio kaj Germanio.

Inter la svedaj judoj, kiuj respondis la demandaron, 82 % deklaris, ke antisemitismo estas sufiĉe aŭ tre granda problemo, kompare kun 60 % en 2013.

Plejparto de ĉiuj, kiuj respondis al la enketo, 90 %, deklaras, ke antisemitismo estas aparte problema surrete.

### Sociaj kaj politikaj aferoj taksataj kiel problemoj

	AT	BE	DE	DK	ES	FR	HU	IT	NL	PL	SE	UK	Mezvaloro
Antisemitismo	73	86	85	56	78	95	77	73	73	85	82	75	85
Rasismo	82	84	76	56	67	90	91	87	68	89	83	79	84
Krima nivelo	28	68	48	32	50	80	68	69	47	34	66	72	70
Senlaboreco	46	71	39	20	94	93	66	98	27	27	52	44	67
Enmigrado	63	74	69	59	57	80	18	71	60	37	63	49	65
Netoleremo kontraŭ islamanoj	69	50	54	60	37	52	69	54	53	83	63	65	57
Registara korupteco	34	48	19	7	95	37	96	91	21	63	18	24	36

#### Rimarkoj:

Entute 16395 respondintoj.

La demando: "En kiu grado vi trovas ke la jenaj aferoj estas problemoj?"

La rezultoj en la tabelo estas sumoj de la respondeblecoj "tre granda problemo" kaj "granda problemo".

Ordigitaj laŭ la mezvaloroj.

Por ĉiu lando la tri plej grandaj problemoj estas kolorigitaj.

Preskaŭ 30 % konstatas, ke ili submetiĝis al persekutado iu-speca. Granda plimulto, preskaŭ 80 %, diras, ke ili ne raportas gravajn okazaĵojn al la polico aŭ al iu ajn alia organizaĵo aŭ institucio, ĉar ili trovas, ke tio neniel diferencas.

Pli ol triono ankaŭ deklaris, ke ili evitas partopreni en judaj eventoj aŭ viziti judajn ejojn pro timo.

En la svedoj 38 % diras, ke ili aŭdis antisemitajn eldirojn kiam ili estis en publikaj lokoj, kio povas esti komparitaj kun landoj kiel Hungario kaj Pollando, kie la nombro estas pli ol 50 %.

En Svedio nur 21 % diras, ke la laboro de svedaj aŭtoritatoj “verŝajne” aŭ “certe” sufiĉas por protekti la judajn

kunvenojn. Tio povas esti komparita al la mezvaloro en la enketitaj landoj, kie 54 % kredas, ke la aŭtoritatoj faras sufiĉe.

Kiam la Komisiono prezentis la raporton en decembro, oni ankaŭ menciis kelkajn klopodojn faritajn de EU en la lastaj jaroj por batali antaŭsemitismon ekz. nomumi kunordigilon por kontraŭbatali antisemitismon aŭ lanĉi Kodon de Konduto pri malampropagando.

☪

Pli da informo ĉe:

<https://fra.europa.eu/en/publication/2012/fra-survey-jewish-peoples-experiences-and-perceptions-antisemitism>

- 
- \* Patro en la ĉielo, mi ne forgesu preĝi por aliaj, kiuj petis mian propreĝon. Helpu ilin kiam ili suferas, en doloroj, en korpaj kaj mensaj malfortoj, en malĝojo, timoj kaj malkuraĝoj. Vi konas iliajn bezonojn.
  - \* Amanta Patro, estu kun la maljunaj homoj. En la vespero de siaj vivoj ili ekkonu vin kaj trovu en vi la veran feliĉon.
  - \* Kompatu la bestojn, ho Kreinto, kiuj devas suferi en ĉiuj tagoj, por ke la homoj manĝu delikate! Pardonu al ni tiun kutimon kaj ŝanĝu ĝin en bonon kaj por la homoj kaj por la bestoj, ĉiuj ja estas kreitaĵoj de vi.
  - \* Hodiaŭ ni memoru, ho Patro, ke via filo naskiĝis por ni kaj venis kiel infaneto en la mondon. Ni ne festu la festojn romantike aŭ tradicie, sed ni pensu al via vera intenco: vi sendis vian filon por savi nin kaj ŝanĝi niajn korojn.

Ni dankas vin.

Honore SEBUHORO

# Edziĝo de muso

Fabelo prezentita de japana grupo  
dum la ekumena kongreso en Poděbrady

**L**onge antaŭe, patra muso havis junan belan filinon. La filino amis bonan junan muson kiu volis edziĝi al ŝi. Sed la patro ne volis ilian geedziĝon.

- Mi volas ke mia bona filino edziniĝu kun la plej supera viro. Mi cirkaŭserĉos la plej fortan edzon en la mondo por mia filino.

Kaj la patro suprenrigardis. La suno brilis.

- Oh, kial mi ne pensis ĝis nun? La plej forta edzo en la mondo estas certe la suno.

La patro trovis la plej altan arbon, suriris ĝin kaj kun granda spiro vokis al la suno.

- Sinjoro suno! Sinjoro suno! Mi deziras ke mia bela filino havu la plej fortan edzon en la mondo. Ĉu vi povas edziĝi al ŝi?

- Mi timas ke vi miskomprenas, respondis la suno. La nubo estas pli forta ol mi. Li baras mian vidon kaj kovras min tute.

La patro turnis siajn okulojn al la nubo kaj komparis ilin.

- Aha! Vi pravas.

Poste la patro kun granda spiro vokis al la nubo.

- Sinjoro nubo! Sinjoro nubo! Mi deziras ke mia bela filino havu la plej fortan edzon en la mondo. Ĉu vi povas edziĝi al ŝi?



- Mi timas ke vi miskomprenas. La vento estas pli forta ol mi. Li povas forblovi min kiam ajn li deziras.

Kaj la patro turnis siajn okulojn al la vento kaj komparis ilin.

- Aha, vi pravas.

Poste la patro kun granda spiro vokis al la vento.

- Sinjoro vento! Sinjoro vento! Mi deziras ke mia bela filino havu la plej fortan edzon en la mondo. Ĉu vi povas edziĝi al ŝi?

- Mi timas ke vi miskomprenas. La muro de la grenejo estas pli forta ol mi. Mi ne povas forblovi ĝin.

Kaj la patro malsupreniras de la arbo kaj iras vidi la muron de la grenejo.

- Sinjoro muro! Sinjoro muro! Ĉu vi aŭdas min? Mi deziras ke mia bela filino havu la plej fortan edzon en la mondo. Ĉu vi povas edziĝi al ŝi?

- Mi timas ke vi miskomprenas. Laŭ mi, la muso estas pli forta. Muso mordas kaj truas min ĉiun tagon. Jen vidu min. Vi trovas miajn multajn breĉojn.

La patro vidas multajn breĉojn kaj li kuretas hejmen, kie troviĝas la filino amata kun junulo.

- Junulo, ĉu vi povas trui muron?

- Kompreneble jes. Tion mi faras ĉiun tagon.

- Junulo. Vi faras bonege! Do, al mi vi povas proponi geedziĝon kun mia filino.

- Jes, mi komprenas.

Tial la junulo proponis al la patro la geedziĝon.

La patro permesis tion kaj la familio fariĝis feliĉa.



Gratulinde, gratulinde!

# Informoj

## Grava atento

En Dia Regno 2018/6 (933), p- 141, estas malĝusta informo pri la konto de "Esperanto-Liga für Christen e.V.". Jam de pluraj jaroj (pro kunfandiĝo de bankoj) la ĝusta estas:

Kontoposedanto: Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V  
Banko: Evang. Bank, Kassel.  
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16  
BIC GENODEF1EK1

La kotizo ekde 2019 estas 25 EUR (\*\* ne: 24 EUR \*\*).

La koncerna komisiito estas mi (ne mia edzino Hedwig Fischer):

Komisiito Rudolf Fischer,  
Gustav-Adolf-Str. 2a,  
D-48356 Nordwalde  
Tel.: 0049 2573 626  
Retadreso: fischru@uni-muenster.de


Komparu: [www.esperanto.de/keli](http://www.esperanto.de/keli)

Kun la plej bonaj deziroj dum 2019  
*Rudolf Fischer*

## La verkisto de la etimologia vortaro de Esperanto, EBBE VILBORG, forpasis en decembro, 92-jara.

**L**i estis sveda filologo pri klasikaj lingvoj, emerita docento pri antikva greka (helena) lingvo en la universitato de Gotenburgo, esperantisto (ekde 1940), leksikografo, terminologo, interlingvisto. Li ricevis internacian laŭdon kaj estis membro de la Akademio de Esperanto (1962–1971) kaj ankaŭ honora membro de UEA.

Ebbe Vilborg multege gravis por la esperantomovado. De 1967 ĝis 1976 li eldonis la interlingvistikan esperantologian cirkuleron FOKUSO. Krom multaj prilingvaj artikoloj, precipe pri gramatikaj kaj terminologiaj temoj, li aŭtoris vortarojn inter kiuj la plej konata estas la verko fundamenta en la kampo de la Esperanta etimologio, nome ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO (1989–2001, kvin volumoj), por kiu li ricevis la OSIEK-premion en 1992. En 2006 li ricevis premion de la Sveda Akademio pro sia Esperanto-vortaro.



La kvin volumoj de la vortaro

Vidu ekzemplon el la vortaro:

GRACI/o (f; RE): A *grace*, F *grâce*, I *grazia* [-ts-], Po *grac/ja*, R *-ija*; L *gratia*. La ekzisto de *-i-* en la radiko povas supozigi, ke Z efektive deiris de la komuna elemento en la apartenanta adjektivo (la subst. kredeble donus *grac-*, kp *besto* < L *bestia*, *memoro* < L *memoria*): F *graci/eux*, R *-oznyj*, (H *-oso*), G *grazi/ös*, I *-oso*. Pri la semantiko de tiu ĉi radiko vd. Waringhien LV 81: “al *gracia* li (=Z) atribuis la signifon ne de F *gracieux*, A *graceful*, D *graziös*, sed ja de F *délié*, A *slender*, D *schlank*, t.e. ‘maldika’”. Inspiron al tiu sencoŝanĝo Z eventuale ĉerpis el L *gracilis* “maldika”. Poste, tamen, ”*gracia*, pro la enveno de la neologismo *svelta*, rekondukiĝis al sia etimologia senco ‘harmonie ĉarma’” (Waringhien LV 87). Pri la rolo de de Beaufront ĉe tio, vd. Fund., p.18, kaj LZ I, 23. La adopto de la formo *graci-* donis eblecon poste enkonduki eo *grac-* Wü (ne Z) kun specialigita religia senco. ¶ 1881 *gracc-*. – 1894 *grazi-*. ¶ Io =, Ie *gracie*, Ia *gratia*.


L *gratia* “ĉarmo; favoro, komplezo; danko” de *gratus* “ĉarma, agrabla, kara, danka”, resp. al Sa *gŭrtá-* “bonvena, agrabla”, kp Sa *grnāti* “laŭdas” (HE rad. \**Gŭer-* “laŭdi, saluti”). Samfamiliaj vortoj en Eo: *agrabla*, *gratuli*.

# Mi volas unuigi min

(laŭ Mechthild von Hackeborn)



1. Mi vo - las u - nu - i - gi min  
2. En ti - u a - mo ŝa - tas mi  
3. Sen Vi ne eb - las aj - na far'.



kun Vi - a am', per ki - u Vi  
la - bo - ron mi - an kap - ti nun,  
Do per - fek - ti - ĝu mi - a ag'



ti - a - me a - gis sur la ter'  
ke es - tu ĝi al Vi - a glor'  
en Vi, sam - ki - el plu - vo - gut'



kaj ver - kas plu - en ĝis \_\_\_\_\_ la fin'.  
kaj al la ben' de' prok - si - mul'.  
sin u - nu - i - gas kun \_\_\_\_\_ la mar'.

## *Jen la germana teksto*

Herr, indem ich mich mit der Liebe vereinige, in der du auf der Erde gearbeitet hast und immerfort wirkst ohne Unterlass, gehe ich an die Arbeit zu deinem Ruhm und zum Segen der Mitmenschen.

Du willst, dass ich tätig sei. Du hast gesagt: Ohne mich könnt ihr nichts tun. so bitte ich, dass mein Tun wie ein Tropfen im Strom vereinigt und vollendet sei in deinem unendlichen, vollkommenen Werk.

*Mechthild von Hackeborn*

HERR, INDEM ICH MICH MIT DER LIEBE VEREINIGE • germana T: Mechthild von Hackeborn, 13a jarcento, en Jörg Zink, Wie wir beten können, Kreuz-Verlag 1970, unua parto ankaŭ en Losungen 2019, la 23an de septembro • M kaj E: Albrecht Kronenberger 2018-12-02